Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda


Aprilo 2003 MENSUEL/MONATA 74-a jaro, n-ro 4 (1174)

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

ISSN 1163.0442 **5 Eŭroj**

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**

SENNACIECA REVUO



Post longa tempo aperas nia SennaciecaRevuo, kiel suplemento de tiu ĉi numero de Sennaciulo

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj,
Vi tenas en la manoj la aprilan numeron de Sennaciulo kaj kun ĝi finfine la novan Sennaciecan Revuon. Espereble vi estos kontenta pri ĝia aspekto kaj ĝia enhavo. Nia redaktoro promesas ekde nun prepari ĝin regule, ĉiujare, en la sama tempo. Evidente, tio ankaŭ dependas de vi kaj de la ricevita materialo.
Pro la monateco de Sennaciulo ni ne povas komplete sekvi la aĉan militon, kiu jam komenciĝis malgraŭ la daŭraj protestoj en la tuta mondo. Nia deklaro estas daŭre aktuala kaj ni invitas vin ĉiujn partopreni en porpacaj manifestacioj en viaj landoj kaj urboj. Ni kontraŭu la agadon de la modernaj barbaroj en ilia kruela imperialisma milito. ***Ĉiu milito estas krimo kontraŭ la homaro!***
Kamaradece al ĉiuj,

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annnuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Komunista frakcio

14a konferenco de IKEK
23-28.05.2003
en Banja (apud Soĝa)Bulgario

Kongrestemo:
Komunistaj movadoj en Bulgario kaj la mondo.
Renkontiĝo kun lokaj esperantistoj.


Aliĝkotizo: 25 eŭroj
Pago de kotizo al : Dieter Rooke, Äussere Klus 14 CH-4702 Oensingen, Svisio. UEA-konto: rook-1

SAT BEZONAS NOVAN KOMPUTILON

Nia malnova komputilo eluziĝis kaj necesas ŝanĝi ĝin. La riparoj de la malnova nun tro kostas. Por la aĉeto de la nova materialo ni bezonas proksimume 2500 eŭrojn.

Ni petas ĉiujn niajn membrojn kaj legantojn finance helpi tiun aĉeton. Ĉiu donaco estas bonvena. La nova materialo faciligos la eldonlaboron kaj la ĝeneralan funkciadon de nia asocio.

Anticipan dankon al ĉiuj!



Nova PIV aperis !
Akiru ĝin ĉe SAT.
Prezo:70 € + afranko
Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €
ekster Eŭropo : 10,06 €

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

SEN KOMENTO

En la revuo "Ondo de Esperanto" aperis ĉi sube legebla artikolo pri SAT, kie ni povas bone vidi kiel vidas nin kaj opinias pri ni iuj t.n. "neŭtralaj amikoj". La artikolon subskribas pseŭdonome, iu Komitatano Z. Ni invitas vin ĉiujn, membrojn de la "formortanta" SAT, reagi al tiu artikolo. Bonvolu sendi viajn reagojn al "ONDO DE ESPERANTO", ab.ja. 1248, RU-236039 Kaliningrad, Rusio. La kopion de via reago eventuale sendu al la SAT-sidejo. Dankon.

La redakcio

Ĉu SAT havas estontecon?

La evento de la pasinta jaro estis la apero de la nova PIV. Plenmerite ĝia ĉefrespondeculo estis proklamita La Esperantisto de la Jaro. Komitatano Z volonte aliĝas al la gratulantoj de Michel Duc Goninaz!

PIV estas eldonaĵo de SAT, tiu internacia organizaĵo, kiu ne permesas nomi ĝin internacia sed sennacia. Tiun koncepton ni filozofie malpli harditaj movadanoj apenaŭ scias bildigi al ni mem kaj certe ne traduki. Scii krome, ke sennacieco kaj sennaciismo estas malsamaj aferoj, kompletigas la enigmon. Sed tio flanken.

Longe SAT estis la sola grava kontraŭforto de UEA, aŭ ĉu pli bone diri apudforto, ĉar diference de la poresperanta UEA, ĝi ĉiam ŝatis emfazi sian peresperantecon. Logike do ĝi eĉ ne povus esti rivalo de UEA, sed en la praktiko ĝi tamen aperis ne nur kiel rivalo sed kiel konscia kontraŭulo de UEA, eĉ malamiko, kiu insiste persvadis siajn anojn eviti la fi-neŭtralan UEA. La bojkoto neniam plene sukcesis. Sufiĉe multaj SAT-anoj trovis ĝin sensenca kaj membris en UEA ankaŭ en la plej floraj tempoj de SAT. Gaston Waringhien, la ĉefredaktoro de PIV, eĉ akceptis honoran membrecon de UEA.

Iam SAT apenaŭ postrestis UEA rilate membronombron, sed nun ĝi postrestas eĉ iujn fakajn asociojn. Ĝi silentas pri sia statistiko, sed supozeble ĝi nuntempe arigas malpli ol mil membrojn. En la pasintjara referendumo pri statutŝanĝo voĉdonis 183 membroj. Se tio estus ĉ. 30% de la membraro, kiel en poŝtaj balotoj de UEA, la tuta membraro estus ĉ. 600. Eble (ĉu espereble?) la SAT-anaro estas malpli aktiva ol la UEA-anaro, ĉar ĝi estas tre maljuna, kaj do la membraro tamen pli proksimas al 1000. Klaras ĉiukaze, ke SAT rapide malkreskas, ĉar ĝiaj membroj formortas. Ĝia kaso minacas elĉerpiĝi eĉ pli rapide. De multaj jaroj la deficito estas sur tia nivelo, ke ĝi forviŝos la kapitalon ene de tri-kvar jaroj. Enspezoj pro la nova PIV verŝajne ne multe helpos. Neeviteble Sennaciulo baldaŭ devos ekaperi nur dumonate anstataŭ monate. La sola plentempa oficisto proksimiĝas al emeritiĝo. Rimedojn por dungi posteulon SAT verŝajne ne plu havos.

SAT suferis de malfavoraj mondpolitikaj kondiĉoj pli ol UEA, sed sian malkreskon ĝi semis mem. La finfine abolita statuta postulo, ke la plenum-komitatanoj estu

Fino, paĝo 52

PLIA GRAVA PERDO POR S.A.T.



Merkrede la 5-an de marto aperis en nia reta leterkesto jena mesaĝo:

"Kun doloro ni informas vin pri la morto, la 3-an de marto, de Sinjoro kaj Sinjorino LEDON, sekve de grava trafikakcidento en Brazilo. Familio Ledon".

Kia ŝoko! Terure! Kia perdo por SAT kaj por ĝenerala Esperanto-movado!

K-do Gilbert René LEDON
(matr. 28.926),

72-jara, malnova fidela SAT-ano estis nia landa peranto en Brazilo. Tre konvinkita, ĝisosta SAT-ano, sennaciulo, ĉie defendis kaj diskonigadis nian Asocion. Kiel landa peranto, li multe varbis kaj eĉ finance subtenis tiujn gekamaradojn, kiuj deziris esti SAT-anoj sed havis financajn problemojn. En la jaro 1988, k-do Ledon perfekte organizis 61-an Kongreson de SAT en Campos-do-Jordão. Krom tio li aktive kunlaboris en Sennaciulo, SR, Liberecana Ligilo kaj aliaj SAT-eldonaĵoj, memeldonis plurajn gravajn verkojn kaj tre ofte donacis la stokon favore al SAT.

Lia kara edzino,

k-dino Symilde SCHENK-LEDON,
(matr. 29.325),

77-jara, ĉefdelegito de UEA por Brazilo, komitatano A. Ŝi faris multon por Esperanto kaj la movado en Brazilo.

La du karaj gekamaradoj kaj amikoj restos ĉiam en niaj memoroj kaj koroj.
Ni sincere kondolencas al iliaj infanoj, el kiuj unu filino, Lilia, estas membro de SAT, kaj al aliaj familianoj.

La Redakcio

samurbanoj — kio praktike siĝnifis, ke ili ĉiam estis parizanoj — kondukis al tio, ke la membraro de SAT restis pli ol duone franca. SAT neniam iĝis vere tutmonda; ankaŭ la resto de la membraro estas preskaŭ nur eŭropa. La parizaj estroj plejparte estis anarĥiistoj k.a. politikaj marĝenuloj, kio ne faris SAT alloga al apogantoj de la ĉefaj maldekstraj partioj. Se la tiamaj estroj estus malpli dogmecaj, antaŭ dudeko da jaroj SAT estus povinta doni hejmon al ekologiemuloj k.a. alternativuloj, sed al tiu ŝanco ili estis blindaj. SAT neniam sukcesis krei pri si bildon kiel organizaĵo malferma, liberala kaj tolerema, unuvorte: progresema. Tamen, ankaŭ se ĝi havus tian bildon, ĝi apenaŭ estus pli granda ol nun. La laborista Esperanto-movado estas fenomeno forpasinta kaj nerevivigebla. Kun milo da membroj reprezentantaj buntan idean spektron SAT tamen vigliĝus kaj pliriĉigus la pejzaĝon de Esperanto.

Meze de la 90-aj jaroj la sinteno de SAT al UEA komencis ŝanĝiĝi. Yamasaki Seikô, klarvida SAT-ano aktivanta ankaŭ en UEA, sukcesis ricevi konsenton de Parizo por SAT-kunsido kadre de la Universala Kongreso. Ĝi iĝis tuj populara. El tiu sukceso la SAT-gvidantoj devus konkludi, ke indas serĉi proksiman rilaton kun UEA. Ekzemple, la SAT-kongresoj, kiuj iĝis malgrandaj kaj enhave malriĉaj, multe profitus, se ili okazus tuj antaŭ aŭ post la UK en ĝia geografia proksimeco. Profitus ankaŭ la kaso de SAT, kaj ankaŭ tion oni ne ignoru. Pri sia sendependeco SAT bezonus timi nur, se ĝia kaso malpleniĝus. Tiam ĝin povus savi eble nur subvencioj de UEA.

Komitatano Z

Liberecana Frakcio perdis majstron



En 1993 transdonis k-do Kribo la redaktadon de Liberecana Ligilo al Gilbert Ledon. La unua numero kiun li eldonis n-ro 77 mirigis ĉiujn pro la riĉa enhavo kaj la bela aspekto. Skribis nia k-do Pelle Persson pri tio en Liberecana Ligilo n° 100: « Gilbert ledon eldonis en la jaroj 1994 - 1998 tre belan eldonon de Liberecana Ligilo, do, n-rojn 77 ĝis 93. Ĝis tiam ni havis libervolan kotizon sed ĉiuj prezoj pri presado kaj precipe afranko altiĝis tiom, ke sen aldono de propra mono de k-do Ledon ne plu eblus eldoni L.L.».

Jen Gilbert Ledon. Jen, mi fakte devas diri la GE-Ledon. Du k-doj kiuj donis sian tutan vivon al la lingvo Esperanto. Symilde iom pli ĉe la flanko de UEA, Gilbert iom pli en la sino de SAT. Ili ambaŭ kapablis distingi du diversajn aferojn. Esperanton kiun ili uzis kaj konstante aplikadis kaj la movadon kiu havis la utilon flanke de la lingvo. Ambaŭ estis ĝisostaj esperantistoj kaj uzis la lingvon ankaŭ en la hejma etoso. Krokodilado, prave, ne estis akceptita dum ĉeesto de Gilbert.

Li havis laŭtegan voĉon kiun li dum debatoj lerte uzis. Intelekte li superis multajn kaj, kvankam li certe de tempo al tempo timigis kelkajn homojn, li fine estis tre afabla persono kaj por la plej multo de la homoj kara amiko.

Dank' al sukcesa kariero, li posedis monon por helpi multajn esperantistojn. Mi neniam aŭdis ke li iam petis rekompencon, aŭ eble jes; neniam krokodilu li preskaŭ postulis. La amikoj Ledon estis malavaraj kaj sindonaj gek-doj.

Ili sciis ke asocioj ne povas funkcii per nur libervoleco, sed ke necesas mono por ke oni plenumu certajn taskojn, kiuj nepre necesas por funkciigi asocion. Mi scias ke ĉiuj asocioj en kiuj ili membris, povis profiti de ĉi tiu malavareco de ge-amikoj Ledon.

Gilbert estis precipe por la Liberecana frakcio de SAT grava persono. Neniu povas nei ke li dum 4 jaroj elspezis multege da propra mono por ke daŭre aperu «Liberecana Ligilo», kaj eble la revuo ne plu ekzistus sen la subteno kaj laboremo de Gilbert.

Lerta parolanto kaj debatanto, majstra polemikisto kiu li estis, Gilbert de tempo al tempo eniris debatojn kiuj ne ĉiam alportis pli da amikoj. Tamen li kapablis, kiel granda sinjoro, konfesi ke li eraris, ke li iom tro krude esprimiĝis kaj li ankaŭ kapablis peti pardonon.

Mi neniam forgesis la momenton kiam mi transprenis la taskon de redaktado de Liberecana Ligilo de nia amiko Ledon. En polemiko li tiel kuspis la harojn de kelkaj k-doj ke oni volis havi novan redaktanton por L.L..

Liberecana Frakcio anstataŭigis la giganton per nano. Mi neniam forgesis la postan «Liberecana Eĥo»-n kiun li aperigis kiel adiaŭan numeron de redaktanto de L.L. Historia dokumento en kiu Gilbert denove montris siajn kapablojn kaj intelekton. Li ŝparis neniun kaj firme donis sian opinion. Neniu kuraĝis respondi kaj pluraj mesaĝoj konsilis al la nano silenti por ne perei.

Feliĉe mi havis la plezuron interkonatiĝi persone kun Gilbert. Unue mi pensis pri renkontiĝo de Davido kun Goljato, sed rapide montriĝis ke du amikoj inter si premis la manon. Neniu sento de konkurenceco montriĝis, sed nur kamaradeco inter du Esperantistoj kiuj tamen regule havis malsaman opinion.

La ge-kdoj Ledon mortis en stulta aŭtoakcidento. Ambaŭ tro junaj kaj tro aktivaj por jam forlasi la diablan mondon kiun Gilbert tiel ofte kritikis.

Ni malhavas nun la tekstojn kiujn li certe verkus, la librojn kiujn li havis en la kapo, la kontribuojn kiujn li pretis fari. Ambaŭ amikoj postlasis grandan truon en Esperantio kaj en SAT.

Gilbert Ledon konsideris sin ĉiam simpla ano de SAT. Titoloj estis al li fremdaj kaj honoron li malakceptis. Tamen ni neniam forgesu lin kaj la karan edzinon. La plej bona memoro por honorigi ilin, por ne forgesi ilin, estas ne krokodili, uzi Esperanton kiam eblas.

Li skribis en la lasta kontribuo al LKK n-ro 105 - "ni bezonas nur uzi la lingvon, same kiel oni uzas la aliajn lingvojn" - ĉi tiu frazo estas tute Ledon. Klara lingvo, rekta kaj firma, sen senutilaj aldonaĵoj.

Saluton Symilde, saluton Gilbert, kaj dankon por la helpo.

La nano

PORPACAJ MANIFESTACIOJ NE AL MILITOJ !

EN BRUSELO

Pere de interreto k-do Claude Glady alvokis la esperantistaron el Belgio kunveni por la manifestacio por paco en Bruselo sur la ŝtuparo de la norda stacidomo de Bruselo.

Kelkaj aktivuloj, SAT-anoj kiuj havas ankaŭ respondecan postenon en Flandra Esperanto Ligo ne povis partopreni pro la jam delonge antaŭvidita jarkunveno de FEL.

Je la unua posttagmeze Jakvo kaj Willem Rasschaert staris sur la ŝtupoj de la stacidomo, profitante de la brila suno, kiu tuj donis al la manifestacio pozitivan karakteron.

Iom post iom Esperantistoj alvenis. Claude kunportis etan Esperanto-flagon kaj ankaŭ amiko, esperantisto el Chimay, kunportis flagon sur granda flagbastono. Li estis la reprezentanto de la esperantistoj motorciklistoj. Krom SAT-membroj venis ankaŭ pluraj amikoj de la Brusela Grupo. Kvankam malgranda grupo, ni estis bone videblaj en la manifestacio. Estas ankaŭ fakto ke ni ne manifestaciis por propagandi Esperanton aŭ SAT, sed por paco. En grupo de Kuracistoj por paco partoprenis nia amiko, SAT-ano, dr Edward Kusters; alia amikino manifestaciis kun la grupo Mahatma Gandi. Laŭ mia kalkulo 14 esperantistoj partoprenis la manifestacion. Sed sciante ke entute partoprenis pli ol 50.000 homoj, povas esti, aŭ certe estas, ke mi maltrafis samlingvanojn kiuj en lokaj grupoj partoprenis.



Je la fino de la manifestacio Willem kaj mi kuris al la trajno ne nur por antaŭigi la amason kiu rehejmis trajne, sed por havi kiel eble plej rapide informon pri la manifestacioj kiuj okazis en aliaj landoj.

Milionoj kaj milionoj da homoj manifestaciis la 15an de februaro 2003 kontraŭ milito, por paco en la mondo. Ni nur povas esperi ke la militemaj frenezuloj aŭdis nian voĉon.

Jakvo

EN MADRIDO

Dimanĉe okazis alia giganta manifestacio en Madrido. Tiu ĉi estis por protesti pri la politiko de la hispana kaj galegaj registaroj rilate al la ekologia katastrofo pro la rompo de la petrolŝipo Prestige.

Grupo de amikoj kun rilato al SAT-en-Hispanio manifestaciis are. Ni alportis afiŝojn kun teksto: "Neniam plu" en Esperanto (ĝi estas la ĝenerala slogano, "Nunca máis" en la galega lingvo)

- Nigra flago kun verda rubando (simila al tiu de la kunvokanta asocio "Nunca máis", sed verda anstataŭ blua)
- Desegno de asocio SATEH, laŭ la emblemo kiun ni jam komencis uzi.

Ni eĉ kantis (iom mallaŭte) ne nur la sloganon "Neniam plu" sed ankaŭ la "konatan" frazon "Merdas la maro pro merda registaro". Ni faris kelkajn fotojn, sed mi ne povas certigi kiam ili estos videblaj.

Amike, Tonyo

EN LUKSEMBURGO

Granda sukceso kaj multkolora.

Laŭ la regiona franca televidilo FR3: 10.000 partoprenantoj. Certe pli laŭ partoprenantoj. Pli ol 900 personoj veturis aŭtobuse de la departemento Moselle al Luksemburgo. Organizaĵoj de la norda Loreno alvokis al Luksemburgo. Aliaj alvenis trajne. La sindikatoj de la tri najbaraj landoj (LU, FR, DE) OGBL, CSGP, DGB, CFDT, CGT...havis komunan banderolon. Multaj kaj diversaj organizaĵoj de la tri landoj partoprenis en bonhumora etoso. Bedaŭrinde mi ne vidis esperantistojn, ĉu iu estis en alia parto de la manistestacio ?

Milionoj en la mondo partoprenis ! Laŭ la televido: unu miliono en Londono, 2 milionoj en Madrido, 2 en Romo, 250 000 en Parizo. Sukceso !

Bruno HENRY
Thionville

EN MOSKVO

La 14an de marto, vendrede, Greenpeace entreprenis "laŭtan" porpacan agadon. Kelkdek anoj de tiu tutmonda naturmediprotektada organizo disvolvis grandegan (ĝia longeco estis 50 metrojn) banderolon kun porpacaj alvokoj "Ne al la milito! Rusio vetou la militon!" sur la ŝtonigita bordo de rivero Moskvo, fronte al moskva Kremlo (sidejo de la prezidento Vladimir Putin). Du el la aktivuloj (profesiaj industriaj grimpantoj) malsupreniĝis per ŝnuroj de la transrivera ponto kaj disvolvis ankoraŭ unu banderolon kun simila enhavo kaj nomo de la organizo. Post dekkvin minutoj motora boateto preteriris la aktivulojn. Ankaŭ ĝi portis grandan banderolon. Du aktivuloj pendantaj de la ponto saltis sur ĝin kaj tiel evitis areston.

Tiun salton mi jam ne vidis, ĉar mi sidis en polica aŭto - mi estis la unua arestito el ĉiuj partoprenantoj. La policanoj reagis sufiĉe malfrue kaj malrapide, kaj pro tio nia agado tute sukcesis. Mi sidis tute kontenta atendante momenton, kiam (post tri horoj laŭ rusia leĝo) mi eliros el la policejo kaj festos la sukceson en kompanio de miaj samideanoj. Tamen la sekvontaj horoj montris ke mi eraris en miaj esperoj kaj ĉio efektiviĝis ne tiom facile.

Ni estis dekdu arestitaj aktivuloj

de Greenpeace en la policejo "Kitaj-gorod" (tute proksime de la Ruĝa Placo kaj la loko de nia agado). Unu el ni estis junulino (fakte ni ĉiuj estis junaj tie) el Usono, Ketrin, kiu la saman vesperon devis flugi al Londono por pasi universitatan enirekzamenon. Ni estis pridemandataj unu post alia pri la okazintaĵo, ĝia celo, nia rolo en ĝi, ktp. Tio daŭris ĉirkaŭ du horojn. Preskaŭ tuj niaj amikoj kiuj restis nearestitaj alportis por ni en la policejon manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, sed la policistoj malpermesis transdoni ilin. Do ni restis iom malsataj kaj soifaj.

Tri horoj pasis, sed la protokoloj ankoraŭ ne estis pretaj, kaj ni ankoraŭ estis tenataj en la policejo. Tio estis kontraŭleĝa. Post ioma tempo oni komencis disdonadi la protokolojn por subskribo. Ni rifuzis subskribi linion, kie temis pri tio ke dum aresto oni legis al ni niajn rajtojn. Ja tio ne okazis. En la protokoloj ankaŭ estis skribita malĝusta horo de aresto - kvazaŭ ni ne estis tenataj pli ol tri horojn. Kiam ni montris tiujn rompojn kaj rifuzis subskribi, oni tuj forprenis la protokolojn kaj ni restadis malliberaj.

Post ankoraŭ ioma tempo la duonon de nia grupo (ankaŭ mi kaj Ketrin estis inter tiuj ses homoj) oni enaŭtigis kaj transportis en la lokan juĝejon. Ni atendis tie pli ol unu horon, sed poste oni anoncis ke la juĝisto estas tro okupita kaj ne emas pristudi nian aferon hodiaŭ. "Ĉu tio signifas ke ni finfine estas liberaj?" "Tute ne", sekvis la respondo, "nun vi estos revenigitaj en la policejon". Ni protestis, ĉar jam estis tro malsataj kaj soifaj, kaj ni bone sciis ke ili donos al ni nek manĝaĵojn nek trinkaĵojn en la policejo. Mi petis eliri por aĉeti manĝaĵojn kontraŭ nia mono. Post iom da diskutado mi iris kun unu policano kaj al ni aliĝis Ketrin, kiu jam videble nervozis, ĉar ĝis ŝia flugo restis malpli ol du horoj. Dum la aĉetado ni sukcesis flustre interparoli pri la situacio kaj elpensis planon de ŝia eskapo. Revenante al la polica aŭto Ketrin subite ekkuris kaj mi provis deteni la solan policiston kiu estis kun ni. Mi sukcesis dum tre mallonga tempo, sed tio sufiĉis por ke Ketrin transkuru la ponton kaj atingu la metrostacion, kie oni povas tre facile "perdiĝi" en la homamaso. Kiam ni revenis kaj la policano raportis al siaj kolegoj pri la okazintaĵo, ili furioziĝis kaj promesis al mi multajn necitindajn aferojn.

Kiam ni (jam kvinope) aliĝis al niaj amikoj en la policejo, ni trovis ilin en malbona humoro. Ili diris ke pluraj arestitoj (ne el nia grupo) estas batataj ĉi tie. Ili vidis tion mem. Kiam ili protestis kontraŭ tio kaj petis policistojn ne bati unu kompatindulon, kiu vendis librojn en metroo (kio estis malpermesita al li), ili nur metis ĝin en apartan ĉelon kaj daŭrigis sian fiagon tie (ni aŭdis terurajn kriojn). Ĝis tio ili batis lin en la koridoro, kie ĉiuj vizitantoj de la policejo povis vidi tion, sed neniu protestis krom ni. Ili batis lin faligitan surplanken per piedoj je korpo kaj kapo. Ni sukcesis peti "audiencon" ĉe la ĉefo de la policejo kaj rakontis al li pri la kontraŭleĝa agado de liaj subuloj. "La arestito en la ĉelo mem batiĝas per sia kapo kontraŭ la muroj", trankvile respondis la ĉefo. Tio jam estis tro! Kiam ni estis venigataj el la ĉambro de la ĉefo kaj preteriradis la enirejon, ses el ni preskaŭ spontanee eksidis ĉe la enirejo kaj interligiĝis per manoj, do ne eblis nin disigi facile. Ni anoncis ke ĉi tio estas nia paca protesto kontraŭ multaj leĝo- kaj homrajt-rompoj, kiuj okazas ĉi tie: kaŭzo de aresto kaj la rajtoj ne estas legataj al la arestatoj, protokoloj estas falsataj, arestitoj estas kontraŭleĝe tenataj en la policejo pli ol tri horojn, arestitoj estas minacataj kaj kruele batataj de la policanoj... Ni diris ke ni sidos ĉi tie ĝis kiam venos amaskomunikiloj kaj fiksos ĉion okazantan por la ekstera publiko.

Ĉi-foje ili furioziĝis multe pli forte. Preterirante ili donadis al ni piedbatojn je dorsoj, kruroj kaj brakoj. Pro malbonŝanco mi sidis ĝuste en la centro de nia "viva ĉeno" kaj ricevadis la plejmulton de batoj. Ili ankaŭ ĉiel minacis, sakris kaj agis tre malĝentile, sed mi jam estis en tia kolera stato ke al minacoj respondis same malĝentile, kolore priskribante ĉiujn fiajn ecojn de ilia parazita malhumana organizo kaj de ili mem kiel inviduoj. Mi mensogus, se mi dirus ke tio multe plibonigis ilian humoron kaj ilian rilaton al mi...

Je unuaj minutoj mi sukcesis per poŝtelefono interparoli kun la oficejo de Greenpeace en Moskvo kaj peti juran kaj amaskomunikilan subtenon. De tiu minuto telefon-aparato en la policejo silentis eĉ ne unu minuton - telefonis ĵurnalistoj, juristoj, petis klarigojn, minacis per esploroj, ktp. Post duonhoro per la sama poŝtelefono mi ricevis ordonon de la estraro fini la proteston, ĉar ili eksciis ke la policanoj estas pretaj uzi mustardan gason kaj perforton. "Despli granda skan-dalo estos", pensis mi, sed la ordono estis ripetita jam pli strikte, kaj mi ne havis elekton, sed povis nur transdoni ĝin al miaj kamaradoj kaj demandi ĉu ili konsentas sekvi ĝin. Same unuece kiel ni eksidis, ni ekstaris kaj rompis la ĉenon. Al tiu momento iom timigitaj de la perspektivo de eventuala apero de amaskomunikiloj policanoj kuris ĉirkaŭ ni kun paperaĉoj, protokoloj, ktp, kaj parolis iom pli milde, eĉ provis ŝerci (tamen ili faris tion tro mallerte kaj stultege - kiel ĉiuj policanoj). Kelkaj vizitantoj de la policejo, impresitaj de nia protesto, nun skandalis pri la policanoj, promesante rakonti pri ĉio okazinta al ĵurnalistoj kaj ĉiuj siaj konatoj.

Preskaŭ tuj post tio, kiam ni ekstaris, venis "delegitaro" el Greenpeace por atesti kio okazas kaj plifaciligi nian liberigon. Post ankoraŭ dudek minutoj ni ricevis la protokolojn. Ni estis firmaj pri nia decido ne subskribi la aĉaĵojn. Do ni verkis apartan deklaron, kie ni listigis ĉiujn rompojn faritajn de la policanoj, ĉiujn batojn kaj minacojn, kiujn ni ricevis. Ni subskribis niajn deklarojn kaj konfesojn, ankaŭ promeson libervole aperi en la juĝejo lunde. Post tio ni estis liberigitaj.

Ekster la policejo nin renkontis niaj samideanoj kaj kamaradoj. Ili aĉetis por ni bakaĵojn kaj sukon kaj rakontis ke pli-malpli detala raporto pri nia agado aperis en novaĵelsendoj de ĉiuj grandaj rusiaj telekanaloj. Ni iom klopodis purigi niajn vestojn (pro piedbatoj ili iĝis ne tiel belaj kiel antaŭe) kaj iris en la oficejon.

La longa kaj laciga tago ne finiĝis per tio, sed finiĝas mia raporto, ĉar ĉio cetera estas aferoj aŭ internaj de Greenpeace aŭ pure privataj (jes, en la oficejo min atendis mia koramikino.

Oleg Izjumenko

Viaj reagoj

DISKUTO PRI ŜANĜO DE LA STATUTO

Laŭ la historio de SAT (eld. 1953), la unua kaŭzo, kiu puŝis E. LANTI kaj kelkajn laboristesperantistajn parizajn kamaradojn krei novan asocio, estis la nete klasbatala situacio, kiu rezultis el la unua mondmilito kaj kondukis al leviĝo de revoluciaj movadoj en aro de eŭropaj landoj, interalie al kompleta ŝanĝo de reĝimo en Rusio.
Tiam estis logike skribi en la statuton de la ĵus kreita asocio: Sub la nomo "Sennacieca Asocio Tutmonda" (SAT) **estas fondita** Asocio, kiu celas: a) utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda...
Estas same logike uzi la -as tempon.
Nun, en la proponita nova teksto, oni daŭre uzas la as-tempon "estas fondita", kvankam ĝi rilatas al ago farita antaŭ pli ol okdek jaroj.
Evidente, ne eblas uzi la is-tempon, **estis fondita**, ĉar tio lasus supozi, ke estis la celoj difinitaj en la nuna propono, kiuj puŝis E. LANTI kaj la kelkajn pionirojn krei la Asocion. Tio estus pura falsaĵo de la historio.
Laŭ mi, tiu parto de la Statuto estas kvazaŭ fundamenta kaj nemodifebla.
Tiuj, kiuj opinias, ke strategie SAT devus adaptiĝi al la nunaj laŭmodaj postuloj de la homaro por varbi novajn membrojn, aŭ kiuj ĉagreniĝas pro la referencoj al "klasaj celoj" (klasbatalo) de la "laboristaro" povus deponi proponon, dum la kongreso, sub formo de gvidrezolucio sen konsekvenca modifo de la Asocia Statuto.

G. LEBEC (28750)

RESPONDE AL INVITO

(Vidu S-ulon de jan.2003, p.10)

Mi gratulas kaj dankas k-don Gilbert Ledon por lia salutparolo, nome de SAT, dum la UK en Fortalezo.

Mi konsentas kun k-do Michel Duc Goninaz, ke formale ne estas tute ĝuste diri, ke "***SAT konsciis, ke el la diverseco en nacioj, rasoj kaj religioj, inter aliaj, elvolviĝas ne nur minacoj sed senĉesaj, malhumanaj konfliktoj.***" Eble pli ĝuste, kvankam iom malpli koncize, estus diri, ke "***la fondintoj de SAT konsciis, ktp.***", kaj "***ili ĝuste konstatis, ktp.***" kaj la formuladon oni ankoraŭ povas kritiki. La vorto "***raso***" estas ja plursenca kaj malbonaŭgura, precipe se oni memoras iujn debatojn, sed Gilbert lerte lasis al la aŭskultanto aŭ leganto la respondecon mem elekti, kion li volas kompreni. - La ceteron de la teksto de la salutparolo mi tute aprobas.

Mi ne scias, kian specifan mandaton Gilbert ricevis de PK, sed kiam mi mem estis membro de la PK, miaj kolegoj ofte komisiis al mi esprimiĝi en ilia nomo en diversaj cirkonstancoj, tute sen detalaj instrukcioj aŭ antaŭa kontrolo. Tio estis riskoplena, ĉar malfacile estas kontentigi ĉiujn, kiel mi spertis, kaj mi ĉiam vane provis distingigi miajn personajn de miaj oficiale funkciulaj diroj. Mi ne povas skandaliĝi, ke SAT-ano esprimiĝas nome de SAT sen klara mandato, precipe se li jam estas funkciulo de SAT, ekzemple landa peranto. Kiam eblas, estas preferinde, ke koncernato konsultu aliajn kamaradojn, sed neniam SAT-ano devas timi esprimiĝi, kompreneble en respondeca, laŭeble supertendenca spirito kaj kun konsidero pri konataj oficialaj pozicioj, nome de SAT. Miloble mi preferas iom kritikindan salutparolon al sensuka, senriske neŭtrala saluto. La vera risko tiuokaze estas kredigi, ke SAT neŭtraliĝis, havas nenion por diri kaj neniam kapablas mem oficiale esprimiĝi.

Petro Levi 23111

PRI LA KLASBATALOJ

(Vidu S-ulon feb.2003, p.22)

"***La historio de la tuta ĝisnuna socio estas la historio de klasbataloj.***" Tiu unua frazo de la unua parto, nomita "***Burĝoj kaj proletoj***", de la **Manifesto de la Komunista Partio**, programo de la (unua) internacia asocio de laboristoj kaj komuna heredaĵo (sen prunto) de ĉiuj klasbatalantoj (socialistoj, komunistoj, liberecanoj kaj aliaj), ne esprimas ideologian koncepton sed science konstatitan historian fakton. Tiu fakto estas nepra konsekvenco de homekspluatado, kiu dividas la socion inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj. Ĝi estas konsiderinde pli kompleksa, ol lasas supozi tiu frazo, kiu resumas multajn volumojn. El tio oni ne povas konkludi, ke ĝi estas akcesora meze de multaj aliaj sociaj faktoj, kiuj estas delikate analizeblaj, nek ke ĝi estas mito.

La ekzistokialo de kapitalo estas ĝia propra kresko, nomita profito. Sub la premo de ĉiam nepre kreskanta profitpostulo, la kapitalistoj ja mem praktikas facile konstateblan furiozan klasbatalon, sed provas trudi la dogmon, ke rezisto al ĝi estas eraro de celobjekto se ne nur efiko de utopia ideologio.

La kapitalismo, en sia simplige detrua tutmonda disvolviĝo, subpremas ĉiujn aliajn formojn de homekspluatado sed ofte lasas plu vasale provizore ekzisti tiujn, kiuj ankoraŭ povas servi al ĝi. Ekzemple sklavismo, kastsistemo, teokratio, azia despotismo kaj feŭdaj formoj de regado eĉ krimaj plu ekzistas sub ĝi kaj pagas tributon. En la komenco de tiu ĉi tria jarmilo, la tutmondiĝinta kapitalismo klare evoluas al speco de nova feŭdismo kun financa centro pli virtuala ol geografia.

Riĉaj virinoj, samseksanoj, anoj de etnaj, "rasaj" kaj aliaj malplimultoj, ne havas la samajn problemojn, kiuj trafas iliajn malriĉajn homologulojn, kaj estas neniel ajn solidaraj kun ili. La problemoj, kiam ili ekzistas por tiuj kategorioj (Louise Michel kaj Margaret Thatcher, en la sama ***subpremata grupo***?), estas plej ofte ligitaj al klasbatalaj cirkonstancoj, kiujn ilia reliefigo eventuale servas por maski. Ili ja servas por dividi kaj malfortigi la ekspluatatojn.

Ankaŭ la ekologiaj problemoj estas subordigitaj al la klasbatalo, kvankam multaj ekologipolitikistoj ŝajnas ne kompreni tion. Ekzemple la troekspluatado de naturaj riĉaĵoj kaj la malpurigo de la vivmedio per

venenoj rekte rezultas de la kapitalista profitsoifo tutmonda.

La kapitalismo nur povas funkcii favore al posedanta malplimulto kaj tial estas kondamnita al pereo; sed ĉi tiu neniel estas fatala. La kapitalismo ja konstante pruvis sian kapablon transpasi sin mem por senlime kreskigi la homekspluatadon. Ĝiaj ĉefaj armiloj kontraŭ ribelemaj ekspluatatoj estas la mistifiko, la korupto, la timigo (kun minaco kaj uzo de kruda perforto), la divido kaj la rezignaciigo. Por venki ĝin, la ekspluatatoj bezonas tiucele konsciiĝi, edukiĝi, debati, kaj organiziĝi por tutmonde unuiĝi. Per Esperanto, SAT povas kontribui en ĉi tiu esenca konstrulaboro. Pri tio kvankam parte kaduka la verko de Lanti, **La Laborista Esperantismo** valoras esti legata kaj relegata kun komprenemo.

Naiva triumfo, paraliza malespero kaj kredo je aŭtomata progreso estas egale fremdaj al la klasbatala spirito de la **Manifesto**: ĉiu proleta venko ĉiam restos provizora, ĝis ĉia formo de homekspluatado estos forigita el la surfaco de la tero, ĉie en la tuta mondo, kaj elradikita eĉ el homaj deziroj; sed ĉia klasbatalo eĉ malvenka, jam nur kontesto, per si mem estas proleta venko, ĉar ĝi estas per si mem fiasko de la burĝa reganta ideologio kaj tial mortminaco por la burĝa regado.

Debato pri klasaj kaj aliaj bataloj neniel pravigas ŝanĝon de la statuto de SAT; sed principa statutŝanĝo nepre rezultigos ankaŭ konsekvence principan ŝanĝon de rilato al tiel ŝanĝita SAT.

N.B. Pri Billancourt, mi kutimis aŭdi aŭ legi la frazon: "***Necesas ne malesperigi*** [la laboristojn de] ***Billancourt.***" Oni atribuis ĝin al komunistaj gvidantoj, pri kiuj oni supozis, ke per ĝi ili pretekste pravigis silentigon pri negloraj veroj koncernantaj socialismajn landojn, precipe Sovetion. Eble do ĝi estis parodiaĵo.

Petro Levi 23111

PRI LA SAT-DISKUTEJO

Delonge mi volis skribi pri SAT-Diskutejo. fine mi decidis diri kion mi pensas pri tiu rubriko.

1) - Mi trovas, ke la rubriko okupas pli kaj pli da loko en Sennaciulo.

2) - En la rubriko ĉiam estas pluraj temoj.

3) - Ĉapitro ofte estas la respondo de kamarado kiu reagas rilate al antaŭa interveno de alia kamarado. La respondo kaj la interveno ofte estas nur ekstraktoj.

4) - La enhavo de la rubriko estas hakita.

5) - Malgraŭ la senpartieco de la kamarado, kiu elektas la temojn, la elektoj estas tiuj de unu persono.

6) - Dum la Kongreso de SAT en Nagykanizsa (2001), kamarado J. Schram indikis, ke nur 66 SAT-anoj partoprenis la SAT-diskutejon. Mi ne konas la nunan nombron, sed tiu ĉi sendube estas ankoraŭ tre malgranda.

Mi ne havas reton, kaj kiam oni ne havas reton, estas malfacile reagi pri artikolo aperinta en Sennaciulo.

Ekzemple:

En Sennaciulo de julio 2001, Miren Cardona skribis artikolon: "Hispanio, pri torturo kaj aliaj fiaĵoj". La artikolo priskribis la situacion en hispana Vaskolando, kaj mi redaktis etan artikolon, en kiu mi diris mian akordon pri la artikolo de Miren Cardona. Mi sendis la artikolon dum la aŭgusto 2001, al la sidejo de SAT. Mi pensis, ke tiu artikolo povus havi lokon en la rubriko "Viaj reagoj" de Sennaciulo. Mi atendis ĝis decembro 2001, sed mia artikolo ne aperis. Eble la redakta komitato de Sennaciulo ne elektis ĝin por la revuo. Dume, mi volis, ke Miren Cardona sciu, ke mi aprobis ŝian artikolon. Mi serĉis la adresaron de SAT, sed mi ne trovis ŝian adreson. Mi skribis unuan leteron, dum decembro 2001 al la Sidejo de SAT kun koverto por la respondo, por ke oni transdonu al mi la adreson. Mi sendis per fakso en januaro 2002 duan leteron al la SAT-sidejo por peti " ĉu oni volas aŭ ĉu oni ne povas sendi la adreson?" Fine mi ricevis respondon per telefono. La artikolo de Miren Cardona estis en la reto kaj la sidejo ne konis ŝian adreson! Mi konkludis, ke Miren Cardona ne estis membro de SAT, sed mi ankoraŭ miras ke SAT publikigas artikolon de nekonata persono.

Mi permesas al mi fari kelkajn proponojn.

1) - Kamarado, kiu havas respondecon de SAT-diskutejo, kiam li rimarkas interesan debaton, li devus peti la redaktadon de artikolo pri la koncerna temo de la debato. Kamaradoj kiuj diskutas en la reto, kapablas skribi artikolon, kaj tiu ĉi aperus en Sennaciulo. Tiel ĉiuj SAT-anoj povus legi kaj reagi pri ĝi.

2) - Mi opinias, ke estas necese aŭtomate meti la membronumeron de la aŭtoro de la artikolo. La numero tuj indikas, ke la aŭtoro estas membro de SAT. Se ne estas numero, la aŭtoro ne estas membro de SAT.

3) - Kiam iu volas reagi pri la artikolo, li skribu artikolon kaj sendu ĝin al la sidejo. La redakta komitato de Sennaciulo elektas ĉu publikigi ĝin aŭ ne.

4) - Se la artikolo de la kamarado, kiu reagis, ne aperas kvankam la aŭtoro tamen deziras transdoni sian vidpunkton al la aŭtoro de la komenca artikolo:

- li povus skribi se oni indikas lian membronumeron;

- se la aŭtoro ne estas membro de SAT, la sidejo devus transdoni al li la adreson.

André Weiss (35.366)

ĈU VI PAGIS VIAN KOTIZON?

DE ĜI DEPENDAS LA FUNKCIADO DE NIA ASOCIO

El la ret@ SAT-diskutejo

Jam kelkajn horojn post la grandaj manifestacioj kontraŭ milito, niaj membroj sendis unuan impreson pri la manifestacioj al kiuj ili partoprenis kaj pri kiuj vi jam legis parton en S-ulo de marto. Estis impone vidi kiel homoj el la tuta mondo reagis al la planoj de kelkaj militemaj homoj, ataki Irakon.

K-do Vincento Charlot, sendis interesan protokolon de Eŭropa preparkunveno okazinta la 8-an kaj 9-an de februaro en Bruselo. Espereble li sendos ĝin estonte ankaŭ rekte al SAT-sidejo. Estas preskaŭ neeble transpreni longajn tekstojn en ĉiu tiu kompilado. Ankaŭ la teksto de Germain Pirlot pri lingvaj problemoj en Tajvanio estis ege interesaj.

Tajvano: Instruistoj ŝokitaj pro planoj dungi 1000 «English native speakers».

Instruistoj estas ŝokitaj pro registaraj planoj dungi 1000 denaskajn parolantojn de la angla en Tajvano. Edukministro Huang Jung-cun tiele esperas progresigi fluecon en la angla.

Tajvano forte konkurencas kun aliaj aziaj landoj por altiri internaciajnfirmaojnperlaboristaro bone scipovanta la anglan, la internacilingvan surogaton ĉe tutmondiĝo. Instruistoj timas, ke la registaro praktiku diskriminacion kontraŭ la propra popolo.

Mi nur kopiis etan parton de la tre interesa teksto ĉar ankaŭ ĉi tiu teksto estas pli longa ol la loko kiun mi posedas por fari mian kompiladon.

Ĉar iu nemembro de SAT volis ludi rolon en la Ĝ.K. de SAT, Pelle Persson sendis interesan kontribuon kiu substrekas la gravecon de Ĝ.K.:

"Mi legis retleteran kontribuon kiu rilatas al la rolo de Ĝ.K., laŭ kiu ĝi ne havas decidan rolon en SAT. Pro tio mi reskribis la sekvantan tekston informcele:

Teksto de la KONVENCIO akceptita ĉe la VIII Kongreso inter la tiamaj LEA-oj. GOTENBURGO - 1928.

"5. Okaze de konfliktoj decidas «Ĝenerala Konsilantaro de SAT» kun la «Plivasta estraro» de konc. lingvoregiona organizo. Se ĉi lastaj ne trovas kontentigan solvon, tiam solviĝu la konfliktoj en speciala kunsido de landaj reprez. kune kun la gvidantoj de SAT okaze de SAT-kongr., kaj en eksterord. okazoj findecidu referendumo inter la membraro de SAT kaj konc. lingvoregiona organizo."

Ĉiuj inter vi certe legis en februara S-ulo la tekston de Djemil Kessous, kiun mi subskribis, pri la forigo de la vorto klasbatalo el la statuto kaj anstataŭigi ĝin per aliaj pli «modernaj vortoj».

Unua reago venis de Gary Mickle: Konatiĝinte kun la propono de Djémil, estis por mi tre malfacile ekhavi firman starpunkton por aŭ kontraŭ ĝi. Mi esperas, ke la debato inter SAT-anoj prilumos la demandon pli multflanke".

La propono de Djémil okupis min enpense, kaj mi pripensis ekzameni la redakcian celdeklaron de SoZ (Sozialistische Zeitung) laŭ tiu konsidero.

Temas pri preskaŭ programeca politika deklaro de ĉiumonate aperanta germana revoluci-tendenca ĵurnalo, kiu

a) sufiĉe eksplicite kaj elokvente klarigas la revolucian politikan celon de la ĵurnalo sen eksplicita mencio de la «klasbatalo», kaj

b) evidente klopodas per diversaj siaj eldiroj progresi al pli moderna revolucia politika celkompreno - same kiel Djémil faranta sian proponon pri la SAT-statuto - kaj eliĝi el la katenoj de la frua 20a-jarcenta pensomondo, en kiu la tuta revolucia maldekstreco pivotis ĉirkaŭ la nocioj «klasbatalo» kaj «laborista movado».

Lavango da reagoj venis poste, kelkaj tre emociaj.

Diris Nikolao Gudskov: La teksto de Djemil en S-ulo estas interesa, sed ĝi havas simpligojn - kaj ĉiu simpligo estas iomgrade eraro. Kaj de tio povas sekvi eraraj konkludoj. Do, mi konsentas pri bezono de certa ŝanĝo de la unua paragrafo de la Statuto, sed pri formuloj necesas longe diskuti. Se la termino «klasbatalo» iel «elmodiĝis», tio ne signifas, ke ni devas nepre ĝin forigi el la teksto, eĉ se la teksto havos pluse aliajn erojn. Mi nun pripensas miajn proponojn (fakte, mi jam havas kaj volis sendi, sed lastmomente rimarkis neperfektecon, do, pensos plu).

Petro Levy referencis al la nunaj paragrafoj 1 kaj 26 de SAT kiu esprimas niajn celojn samtempe pli klare kaj pli koncize.

Jakvo reagis tiel: Evidente klasbatalo estis neniam tiel aktuala kiel nun. Mi sendis mesaĝon pri miaj spertoj en Usono (decembro 2002) al Gary en kiu mi esprimis mian grandan miron pri la plilarĝiĝanta abismo inter la diversaj klasoj en Usono. Ankaŭ en la malnova Eŭropo ni pli kaj pli spertas tion.

La teksto de Djemil ne rilatas al la fakto klasbatalo, sed nur la vorto. Mi konstatas kaj certe ne estas tutsola pri tio, ke homoj malŝatas la vorton klasbatalo. Precipe la veraj mizeruloj en la «riĉaj « landoj. La vorto klasbatalo signifas por ili stampilo de malsukceso. La homoj el Orient-Eŭropo (kaj pri tio mi devas fidi tion kion mi legas en libroj) malŝatas la vorton pro historia kialo kiun mi certe ne devas ekspliki. Tamen estas fakto ke pli kaj pli kreiĝas pliakriĝo de klasa diverseco.

Alia reago estis de Pelle: Mi bedaŭras ke estas multaj nuntempaj SAT-anoj kiuj forgesas ke SAT devus esti TUTMONDA laborista organizaĵo. Niaj gefratoj en la Tria Mondo estas ĉiutage senkompate ekspluatataj de okcidentmondaj kapitalistoj. Nia tasko en SAT devus ja esti savi niajn malfeliĉajn gefratojn en la Tria Mondo el tiu senkompata KLASBATALA ekspluatado. Jen estas inda tasko por SAT: Solidare kunhelpi en la plifortigo de la sindikataj movadoj en la Tria Mondo! (La ideoj de k-do Lanti estas ankoraŭ studindaj!).

Alia ĉefrolulo en la debato estas Petro kiu skribis: "Ekzemple en 1938, dum la 18-a Kongreso de SAT, en Bruselo, estas farita la propono, ŝanĝi la statuton tiele, ke malaperu la linioj pri klasaj celoj kaj klasbatalo. Mirinde moderna estis la argumentado: «La internacia laborista movado montris sin malkapabla regi la cirkonstancojn postmilitajn (post 1918 ...) kaj krei novan ordon. La klasbatala ideologio estis necesa por lukte plibonigi la vivkondiĉojn antaŭ duonjarcento. Sed nuntempe tiu opinio ne plu estas absolute laŭtempa... La tiamaj malprogresemaj kongresanoj rifuzis la proponon.

Interesan intervenon sendis Renato Corsetti: "kiam la dioj de kapitalismo volas pereigi maldekstran asocion, unue ili instigas ĝin okupiĝi pri teoriaj kaj statutaj problemoj".

"Mi konsentas kun Jakvo ke SAT devas esti kupolo por ĉiuj maldekstraj specoj de maldekstruloj (verduloj, portalegranoj, eventuale eĉ islamanoj, kiuj provas batali kontraŭ la imperiismo de la okcidentanoj, ktp.).

Tamen mi pensas, ke pli gravas konkrete serĉi tiujn esperantistojn kaj ligi ilin al SAT ol debati pri tio, ĉu ni forigu aŭ ne la vorton «klasbatalo».

Vi komprenas eble ke mi estas kontraŭ forigo de ĝi kaj samtempe por okupiĝado pri kontaktoj kun maldekstraj esperantistoj ekster SAT.

Mi volas fini per tre bone verkita reago de Marie-Helene, nov-bakita SAT-anino,

Konsideri ke homoj, kiuj ne sentas la vorton «klasbatalo» aktuala, estas suspektindaj detrui la idealon kaj la celojn de SAT, egalas al mortigi la debaton jam en la ovo. Cetere, ĉu temas pri forigo de tiu vorto? Aŭ pri aldono de pliaj nuancoj?

Suspekti la homojn detrui la ideon ĉar oni deziras trovi pliajn vortojn kiuj plej esprimas mondan transformiĝon, estas insultema al gefratoj kiuj engaĝiĝas. Kial, en tiu kazo, miloj da homoj engaĝiĝas en sociaj forumoj ?

Kial ili elspezas sian tutan energion, atestante pri la situacio? Ĉu por pacumi kun faŝistaj ŝatoj, kun kapitalismaj interesoj ? Kelkaj ja prenas grandegajn riskojn en sia lando, tion oni ne povas forbalai.

Kiel ĝuste rimarkigis Jakvo, SAT ja delonge okupiĝas pri tio kio nun zorgigas tiujn homojn. Ili ja estas progresemaj, deziras fari ion. Neutrala asocio prave ne povas reprezenti ilin. SAT estas la taŭga asocio, ĝuste pro tio mi venis ĉi tien. Kial fermi la pordojn ?

Kelkaj vortoj ja havas riĉan historion, kaj ne temas pri ties forigo kaj forgeso. Cetere, ĉiu progresemulo devas konsideri nepra kleriĝo la socian historion. Sed la nuna situacio trudas al ni aliajn vortojn por diri teruran transformiĝon al senvizaĝa diktaturo. Kaj la lingvoj ja ŝanĝiĝas. Esperanto estas por multaj ilo por helpi homojn kleriĝi, konscii pri la cetera mondo, forĝi proprajn ideojn, foje liberiĝi el moralaj aŭ politikaj antaŭjuĝoj. Ĉu ni devas izoliĝi en vortprovizo, kiun homoj rilatigas kun tre specifa historio de tre specifaj grupoj? Ne temas pri allogo de indiferentaj homoj, sed pri neforpelo de ili, pri esprimo de nia diverseco!

Ja ekzistas vortoj por diri kio okazas nun en la mondo. Ne nur «klasoj».

Aliaj batalas por «distributiva ekonomio». Multaj opinias (ne nepre mi), ke la vorto «laboristo» ne plu koncernas tiujn kiuj jam delonge pluvivas sen iu ajn okupo nek salajro. En Maroko ekzemple kiun mi pli malpli bone konas, plej ofte laboro estas sopirata sed ne konata sperto.

Ĉu SAT ne devus ankaŭ havi sufiĉe larĝan vortaron por lasi spacon al ĉiuj progresemaj tendencoj ? Aŭ ĉu tiuj tendencoj nur estas por ornami la retpaĝojn ? Ĉu oni devas trudi al ili vortaron kiu ne respondas al iliaj ideoj ene de SAT ?

Sed Petro parolis pri senhonta ekspluatado, kaj laŭ mi, temas precipe pri tio : klasbatalo estas unu flanko de la afero, kiam la batalo fariĝis silenta morto, kiam la klasoj ne plu estas definitivaj, sed ege moviĝemaj, kiam entreprenoj kies kapitalo flugas super la ŝtatleĝoj, super eĉ la homoj, regas ĉies vivon.

Ekzistas nemensogemaj vortoj. Oni ne devus rezigni pri tiu debato, simple ĉar oni ne jam trovis la ĝustan manieron ordigi ilin.

Certe la debato pri forigo de la vorto (neniam la ideon) klasbatalo el nia statuto daŭros. La debato nur ne povas drivi kojnon inter la membroj pro tio ni kiel eble plej racie partoprenu al la debato.

ĈU VI JAM ALIĜIS AL NIA KONGRESO ?

RIĈEGA PROGRAMO KAJ SATECA ETOSO ATENDAS VIN !



TAGA VIVO
Redaktas: Gerardo Rollin
88 str. Victor Hugo
FR-37400 AMBOISE
<a.reto@france-association.com>
Kompilo en TTT :
http://www.creaweb.fr/a.reto
Rubriko: "Forumoj"

Post ioma silento, nia rubriko reaperas per nova temo, kiun ni povas titoli per unu simpla vorto : « misvivo » aŭ «misvivoj». Certe la reagoj estos nombraj kaj viglaj. La signifo de nia vivo kuŝas tie apud ni, kaj ni devas ĝin analizi sen tabuoj, inter progresemaj socialistoj. Vi ne rajtas cerbo-mitelumi antaŭ fundamentaj problemoj ! Dankon. G.R.



Je la 50a sonoris la horloĝo

VIVOPERDO

Antaŭ nelonge mortis Angela, malnova amikino mia. Ŝi estis nur 52-jara, kaj daŭre restis juna ĝis la fino.

Sur la hospitala lito, kie ŝi ripozis pro kancero, ni longe interbabilis pri ĉio, pri la metio, pri la vivo. Kaj tiam subite ŝi ekploris konfesante, ke ŝi komplete mistrafis sian vivon. Granda surprizo je mia flanko, sed post eta cerbumado, mi devis iel samkonkludi kiel ŝi. Tamen mi ne oficiale agnoskis.

Ŝian infanecon mi ne konis. Sed en momentoj de ŝia vivo mi regule partoprenis. Eble 20-jaraĝa ŝi renkontis Jurgen, kun kiu ŝi idealisme vivis. Sub influo de la tiama « reiro al la naturo » ili ambaŭ luprenis terenon kaj tie ekrikoltis asparagojn kaj diversajn legomojn. Sed la grundo ne estis riĉa, kaj la rikoltoj malabundis. Ili vivis tre mallukse, kaj ilia filo Mikaelo kreskis inter malpleno de mebloj kaj de ludiloj.

La situacio iĝis kruele malfacila, kaj Angela decidis reiri al la universitato por trapasi kelkajn ekzamenojn. Rapide ŝi akiris instruistan diplomon, kiu ebligis al la familieto ĝui pli kvietajn tagojn. Jurgen neniam konsciis, ke li neniel ricevis terkulturisman edukon, kaj ne povis sukcesi en tiu fako. Anstataŭ pripensi alian vivon, li obstine deziris konservi sian praideon.

La paro ne tiom plu akordiĝis, sed nefacile Angela decidis disiĝi de Jurgen. La paso estis delikata kaj ŝi longe bezonis psikiatron por superi la situacion. Al tiu aĉa situacio, aldoniĝis la konstato, ke ŝi ne facile instruis la francan lingvon al jam altaj kaj moviĝemaj geknaboj. Tiu metio en si mem kreas fortan streson, kaj, aldone al familiaj premoj malstabiligis la junan virinon. Tiel Angela iĝis trosentema kaj impulsema. Pli kaj pli ofte ŝi falis en koleregojn, des pli grandegaj ju pli senkaŭzaj. Ŝi suferegis pro neagrabla forlaso de siaj junecaj revoj, kaj pro neebleco denove vivi esperigan entuziasmon.

Je la 50a jaro, sonoris la horloĝo… La trofumado de cigaredoj kreis engorĝan kanceron, kiun oni malfacile detruis. Tiam ŝi longe cerbumis dum hospitalaj restadoj. Angela iris al la konkludo jena : « Mi komplete mistrafis mian vivon„.

La fino de mia amikino multe impresis min. Ni ofte kaj longe interbabilis en kompliceco de intimaj virinoj. Certe ia vivo estu instrua al ni.

Ĉu mi estas certa, ke mi mem ne mistrafis mian vivon? Ankaŭ mi, 50-jara mi troviĝas sola. Mi dediĉas mian plentempon al socialismo, kiun mi sendube neniam vivos. Mi agadas en esperantismaj medioj, kiuj videble ne disvolviĝas. Do ĉu mi ne elektis misan vojon? Ĉu mi kapablus provi novan vivon?


Rekomenci novan vivon kun alia viro? Mi ne kapablas.


Ĉu en viaj agadoj, vi neniam spertis tiun certecon : Ke mi agadu aŭ ne, la rezulto estos sama?. Preferinde forlasi la aferon kaj ĝui la sunon en naturisma tendumejo! Kaj tamen ne eblas tion decidi…

Ofte mi parolas kun kamaradoj, kiuj konfesas la tempoperdon labori kun homoj ne batalemaj. Pro moleco ili ne alportas konkretan forton, kaj ni restas solaj. Krome ne eblas starigi agadojn konkretajn por plibonigi la situacion.

Mi mem longe dediĉis du jardekojn en porpacisma agado. Pro laciĝo mi demisiis, sed kial mi atendis tiom longe dum ekde la komenco mi "flaris" la aferon?

Astrid





76-a SAT-KONGRESO

ĈAŬDEFONO

12-19 Julio 2003

OKK : David Buhlmann (30984), Francisko Degoul (32785), Perla Martinelli (35546), Dieter Rooke (35571), Giorgio Silfer. Ekstera pri librotenado : Sonja Brun.

Adreso : 76-a SAT-Kongreso, ĉe KCE, cp 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, (Svislando). Rete: <esperanto.kce@esperantio.net>
Tel/fakso : +41.32.9267407.

KONGRESKOTIZOJ

Kongreskotizoj :

Ĝis la dato :	31.03.03	31.05.03	Poste
SAT-membro	65 €	75 €	85 €
SAT-geedzoj (se ambaŭ SAT-anoj)	110 €	130 €	150 €
SAT-junul(in)o (ĝis 25 j)	38 €	48 €	58 €
Gasto	80 €	90 €	100 €
Gasto junul(in)o	45 €	55 €	65 €

Infanoj ĝis 15 j. ne pagas la kotizon.
La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI ĝuas 30 procentan rabaton. La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI) kaj de ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Sud-Afriko, Usono) ĝuas 50% rabaton.

Personoj el lando bezonanta enirvizon por Svislando devas indiki tion antaŭ la 31-a de marto 2003. Post tiu dato ne estos plu eble trakti ilian peton.
Por profiti la SAT-tarifojn sufiĉas aliĝi al SAT por 2003. La kongreskotizo kovras la kongresan programon kaj aneksajn (dokumentujon, ktp).

UNUA LISTO DE KONGRESONTOJ

1. ANDO MURASAKI Viola; 2. ARI MARTINELLI Perla; 3. BALLAGUY René; 4.BANASZEK Evelyne; 5. BANNIER Jacques; 6. BARKOVIĈ Kreŝimir; 7. BELENJUK Galina; 8. BERNARD Francis; 9. BERNARD Sinjorino; 10. BERNARD Simonne; 11. BORDES FERRER Santiago; 12. BOURLOT Carlo; 13. BUHLMANN David; 14. BUSTIN Marteno; 15. BUSTIN Liya; 16. CABRAFIGA Monserrat; 17. CHASSARD-CAUBEL Renata; 18. CONDE REY Marie-France; 19. DEGOUL François; 20. DUC GONINAZ Michel; 21. DUC GONINAZ Arlette; 22. DURAND Daniel; 23. EMANUELSSON Agneta; 24. ENDERBY Kep; 25. ENDERBY Dorothy; 26. FELSZEGHY Judit; 27. GACOND Claude; 28. GARINO Kristian; 29. GEĤT Grigorij; 30. GENTE André; 31. GENTE Hélène; 32. GEORGIEVA Reni; 33. GONĈAROV Anatolo; 34. GRIMAUD Jean; 35. HAMMAMBERG Jarl; 36. HARDY Roger; 37. HOEIJENBOS Kees; 38. HOEK VAN DEN Luc; 39. HOLEVIĈ Aleksandar; 40. HOLEVIĈ Nelly; 41. HOLLINGER Max; 42. KAISER Hans-Georg; 43. KAISER Dorotea; 44. KARATZAFERIS Nicolas; 45. KARNER Klaus; 46. KEABLE Stan; 47. KESSOUS Djémil; 48. KESSOUS Michelle; 49. LASZAY Anna; 50. LEDON Gilbert-René; 51. LEDON Symilde; 52. LYNN Ronald; 53. MAĜAROVA Ivaniŝka; 54. MAKAVEEVA Milena; 55. MARCANTI Anne; 56. MICHAUD Gisèle; 57. MICKLE Gary; 58. MONIER Edmond; 59. MONIER s-ino; 60. MONTAGNER Andrea; 61. MORIN Jacques; 62. NEMERE Istvan; 63. NEMERE Ilona; 64. NILSSON Bertil; 65. NUÑEZ HERNANDEZ Mayra; 66. OPULSKIENE Gražina; 67. PERSSON Pelle; 68. PONTNAU Robert; 69. POUX Jacqueline; 70. PRENT Arturo; 71. PRENT Mary; 72. RALALARISOA Lala Justine; 73. RIBAS Marie; 74. RIBAS Antoine; 75. ROOKE Dieter; 76. SALGUERO José Maria; 77. CIDONCHA Carmen; 78. SARRUT Robert; 79. SCHRAM Jakvo; 80. SILFER Giorgio; 81. STOJANOVA Ivanka; 82. STUPPNIG Martin; 83. SUAREZ Manuel; 84. TAHIRA Masako; 85. TOUBALE Franciska; 86. TRIFONĈOVSKI Ljubomir; 87. VARGAS GUTIERREZ Eduardo; 88. VIDAL Madeleine; 89. VOHLA Frank; 90. WEIDMANN Dietrich; 91. WEIDMANN Nelida; 92. WESTERMAYER Manfred; 93. ZELAZNY Walter.

4-a KONGRESA KOMUNIKO

PROKSIMIĜAS LA LIMDATO DE LA 31a DE MARTO

Je la noktomezo de la 31a de marto altiĝos ĉiuj tarifoj por partopreni en la SAT-Kongreso, kaj aldoniĝos dekeŭra tarifo por la tuttaga ekskurso: fruaj aliĝintoj ja busos senpage. Se iu el la ricevantoj de ĉi tiu bulteno ne jam sendis sian pagon, bonvolu rapidi por ŝpari!

PRESKAŬ SENPAGE ĈIEN EN LA URBO

Danke al speciala bileto (plus horarkarto), la kongresanoj rajtos:
- veturi senpage per ĉiuj busoj, en Ĉaŭdefono, en Loklo kaj inter la du urboj;
- eniri senpage ĉiujn muzeojn de Ĉaŭdefono kaj Loklo (entute ses);
- eniri senpage la publikan naĝejon;
- parki senpage en ĉiuj bluaj parklokoj;
- havi propran flavan parklokon en la kongresejo.

La speciala karto kostas nur 35,- CHF kaj daŭras sep tagojn! Nur kvar veturoj buse ĉiutage (la minimumo inter tranoktejo kaj kongresejo) kostus ĉ. 50,- CHF dum la semajno... La karto estos aĉetebla nur ĉe la OKK, je la alveno.

KONTRIBUOJ AL LA KULTURA KAJ POLITIKA PROGRAMO

Pliaj proponoj estas bonvenaj.
a) PRELEGOJ KAJ DEBATOJ

D-ro Kep Enderby, SAT-ano kaj prezidinto de UEA, prelegos pri ***"Unu Mondo -- etikoj de tutmondiĝo"***. La etikaj polemikaj diskutoj kaj la proponataj respondoj, por kaj kontraŭ, prave kaj malprave, prezentataj al ni, kadre de la nuntempa rapide ŝrumpanta mondo kaj procezo de tutmondiĝo. Kiujn subteni? Ĉu ni progrese antaŭeniras al supera grado de disvolviĝo aŭ ne?
Provizore: dimanĉon, 11h00 ĝis tagmanĝo, en salono Lanti.

Mag. Perla Martinelli, SAT-anino kaj senatano de la Esperanta Civito, eksa ĝenerala sekretario de la Akademio de Esperanto, prezidos rondan tablon pri: ***"Plena Ilustrita Vortaro unu jaron poste: dankoj kaj mankoj"***. Estas invititaj interalie Michel Duc Goninaz kaj Eric-Dieter Krause.
Provizore: dimanĉon, 17h00, ĝis vespermanĝo, en salono Lanti.

Prof. D-ro Walter Zelazny, SAT-ano kaj Konsulo de la Esperanta Civito, prelegos pri: ***"Esperanto vidalvide al sociaj kaj religiaj pensoj, kun aparta analizo pri lantiismo"*** La apero de Esperanto kaŭzis diversajn sociajn, religiajn, ideologiajn *mutaciojn* kaj kreis novajn ideojn. La sennaciismo de Lanti estis la plej konsekvenca kaj samtempe la plej radikala kaj relative memstara ideologio, kiu ligis la lingvon de Zamenhof, ties certajn pensojn kun diversaj anarkiismaj kaj marksismaj paradigmoj de la epoko. La celo de la prelego estas montri tutan mozaikon de diversaj ideoj, kiujn naskis la apero de Esperanto, kompari ilin kaj eltiri praktikajn konkludojn.
Provizore: lundon, 17h00, ĝis vespermanĝo, en salono Lanti.

K-do Daniel Durand, Prezidanto de la Mondcivitana Registrolibro, prelegos pri: ***"Al tutmonda demokratio: la preskaŭ 60jara sperto de la mondcivitanoj"*** Skiza historio ekde la antaŭdiskutoj pri la UN-Ĉarto ĝis la alternativa tutmondisma movado, tra la fiaskinta Mondkonstitucianta Asembleo en Ĝenevo en 1950 kaj la diversaj klopodoj de la mondcivitanoj kaj de kunagantaj movadoj al starigo de reprezenta tutmonda demokratio. La eblaj proponoj kontraŭ la gravaj defioj por estonteco.
Provizore: mardon, 15h00-16h30, en salono Lanti.

Mag. François Degoul, SAT-ano kaj Civitano, prezidanto de Instituto Zamenhof, prelegos pri:
"La rolo de SAT kaj SAT-anoj en zamenhofologiaj studoj" La rolo de SAT sur la prilingva tereno estas bone konata kaj la lastjara eldono de la Nova PIV konfirmas tion. Sed oni ne sufiĉe rimarkis ke ankaŭ la zamenhofologiaj studoj ŝuldas al SAT la eldonon de la duvoluma verko "Leteroj de L.L. Zamenhof" en 1948, dank' al la grava laboro de Waringhien, kies personaj komentoj fakte konsistigas kvazaŭ novan biografion de la majstro, almenaŭ por la koncerna periodo, 1901-1904. La sama Waringhien, SAT-ano, 30 jarojn poste kuraĝigis la verkadon de "La kaŝita vivo de Zamenhof", far Maimon, nova gravega kontribuo al la kono de tiu vivo. Post Waringhien aliaj SAT-anoj kontribuis diskonigi la penson de Zamenhof, interalie homaranismon. Ĉu nur hazarde SAT-aneco ligiĝas al Zamenhof? Ĉu ne intime interrilatiĝas la du pensmanieroj? Provizore: mardon, 17h00 ĝis vespermanĝo, en salono Lanti.

K-do Arturo Prent, SAT-Komitatano, enkondukos al ***"Politika kaj socia forumo"*** Libera diskuto pri aktualaĵoj kaj komparado de kondiĉoj en diversaj lokoj, precipe rilate laboristojn.
Provizore: ĵaudon, 13h30-15h30, en salono Ivo (Peyraut).

K-do Jakvo Schram, SAT-Komitatano, redaktoro de "Sennacieca Revuo", prelegos pri ***"Lingvo, klasbatalo kaj ĝia ligiteco"***. La lingva malsameco en Belgio (eble en la cetero de la mondo) precipe estis batalo de la politiko, multe pli ol la viktimoj de la problemo, la laboristoj. Ofte oni parolis pri la fakto ke dum la unua mondmilito mortis tiom da junaj soldatoj pro manko de lingvokono (precipe la franca). Montriĝas tamen ke tio ne estis la kazo de tiom da flandraj knaboj. Lingvobatalo kaj klasbatalo estas unueco, diris siatempe Bebel. Ĉu li pravas? Parte jes: lingvo estas parto de

la subpremo de la laboranta klaso. Gravas evidente ankaŭ lingvaj rajtoj. Kion tio signifas? La rajto al propra lingvo, por ĉiuj kun ĉiuj konsekvencoj?
Provizore: ĵaŭdon, 17h00 ĝis vespermanĝo, en salono Lanti.
D-ro Giorgio Silfer, membro de la Kortumo de la Esperanta Civito, prelegos pri ***"La Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj -- Barcelono, 6an de junio 1996"***. La koncepto de lingva minoritato multe evoluis, de la unua difino fare de Ligo de Nacioj en 1931 ĝis la Universala Deklaracio proklamita en Barcelono. Interalie ĝi atingis la distingon inter lingva komunumo kaj lingva grupo. Kaj donis sociologie profilon al la esperantistaro kiel diaspora lingva grupo.
Provizore: vendredon, 17h00 ĝis vespermanĝo, en salono Lanti.

b) KUNVENOJ DE ORGANOJ, FRAKCIOJ, KOMISIONOJ

La ĝenerala Kunsido kunvenos unuafoje dimanĉon, 13h45-16h45, en salono Lanti. Duan kunvenon ĝi havos lundon, 13h45-16h45, en salono Lanti. Tria kunveno disvolviĝos mardon, 9h00-12h00. Lastan kunvenon ĝi havos vendredon, 9h00-12h00, en salono Lanti.
La Ekologiisma-Verda Frakcio kunvenos unuafoje lundon matene, sub la gvido de Grigori Geĥt kaj Manfred Westermayer, ekde 9h00, en salono Alberto (Einstein). Postaj kunsidoj decidotaj surloke.
La Komunista Frakcio kunvenos unuafoje lundon matene, sub la gvido de Stan Keable, ekde 9h00, en salono Ernesto (Dresen). Postaj kunsidoj decidotaj surloke.
La Liberecana Frakcio kunvenos unuafoje lundon matene, sub la gvido de Jakvo Schram, ekde 9h00, en salono Ivo (Peyraut). Postaj kunsidoj decidotaj surloke.

c) MUZIKO

Anjo Amika kantos en diversaj okazoj.
Studgrupo pri muziko kaj danco el Kubo, sub la gvido de **Mayra Nuñez Hernandez**, Havano: lundon, mardon, ĵaŭdon kaj vendredon, laŭ horaro kaj lokalo indikotaj (probable salono Drezen).
Koncerto de klezmera muziko, kun diapozitivoj pri la medio de kie devenis la Zamenhofoj, kaj klarigoj en esperanto, okazos mardon je 20h30, en salono Lanti. Ludos kaj kantos la ensemblo Razzmatazz el Svislando/Nov-Jorko.
Solo el Hispanio estos la protagonisto de la ĵauda vespero: li kantos okaze de la bankedo, kaj vervigos la etoson per sia originala personeco.

d) TEATRO

"Peĉjo kaj la lupo" de Prokofjef. Kun svisa orkestro kaj esperanto-deklamisto, ĝi estas ĉarma fabelo, por ĉiuaĝaj infanoj. Provizore: merkredon je 20h30 en salono Lanti. NE CERTA
"La familio de Anto Speri" de Giorgio Silfer, per la reĝisorado de Dany Jordanov kaj la aktorado de junulara esperanto-trupo, estas la unua teatraĵo pri la esperanto-familio. Detaloj en "Literatura Foiro". Provizore: lundon je 20h30 en salono Lanti. NE CERTA
Mozaika Kultura Vespero, gvidata de Anjo Amika. Por la gekongresanoj kiuj havas emon kanti, deklami aŭ lautlegi poemo(j)n, grupeto(j), kiuj ŝatus prezenti teatraĵeton, dancemulaj grupetoj, estas bonega ebleco partopreni en tiu kultura vespero. Vendredon je la 20h30 en salono Lanti.

e) LITERATURAJ KAFUMOJ

Literaturaj kafumoj (kun kafo kaj sen fumo) okazos lundon, mardon, ĵaŭdon kaj vendredon en salono Klara (KCE), je cent metroj de la kongresejo, 15h30-16h45.
La ĵaŭdan gvidos **Hans-Georg Kaiser**, beletristo. Li legos el sia traduko: ***"La mortula ŝipo"*** de B. Traven, kiun oni trovas en la ttt-ejo: www.karapaco.de. Estas la romano pri senpasporta maristo. Ĉiujn informojn pri libro, resumon, lian enkondukon kaj tiun de la aŭtoro oni povas legi en tiu hejmpaĝo.
La vendreda estas rezervita al c-ano **István Nemere**, verkisto, trifoje laŭreato de la premio "La Verko de la Jaro", prezidanto de Esperanta PEN-Centro. Se li povos ĉeesti, kiel li esperas sed ne certas, li parolos pri sia lastatempa produktado, vidalvide al la evoluo de la mondo. Li ankaŭ pretos aŭtografi la librojn kiujn la kongresanoj proponos al li, aĉetitajn en la KCE-libroservo aŭ kunportitajn de la hejmo.

f) DIVERSAJ

K-ino TAHIRA Masako el Japanio gvidos aŭkcion de interesaj kaj valoraj objektoj, antaŭ ĉiu laborkunveno, dum kelkaj minutoj. La bonhavo por la aŭkcio estos destinita al la financado de SAT-Japanio.
K-ino ANDO Viola Murasaki gvidos studgrupon pri japanaj arto kaj tekniko. Origami, Hurosiki, Obentoo ne estos plu mistero por vi. Aldone, vi lernos ankaŭ la japanan librobindadon. Lundon, mardon, ĵaŭdon kaj vendredon laŭ horaro kaj en lokalo indikotaj (probable salono EmBa).

KINO: VESPERTA HORO

De dimanĉo ĝis vendredo (escepte de ĵaŭdo) je 23h00 la noktemuloj povos spekti filmojn en esperanto, en salono Aleksandro (Szathmári), en la ĉefa hotelo. Jen la programo:

dimanĉon

"Angoroj" de J. L. Mahé. La unua fikcia filmo en esperanto. Inter la rolantoj, tre juna Michel Duc Goninaz. 60'

lundon

"En Eŭropo ie" Admirinde dublite en esperanto, ĉi tiu klasikaĵo de la hungara filmarto estas daŭre spektinda protesto kontrau ĉiu milito. 60'

mardon

"Mefisto", de István Szabó. Unu el la plej profundaj filmoj pri naziismo, vidata en ĝiaj rilatoj kun artistoj. 120'

merkredon

"Babel" de Yvon Davis. Malkvietige futurologia filmo, en mondo trafita de insida epidemio (probable AIDS), pli kaj pli maldemokratia, pli kaj pli malkapabla komuniki. 40'

vendredon "Espere despere", tri humuraj teatraĵoj pri esperanto kaj ĝia socio: "Budapesta ekzameno" de Sándor Szathmári; "Lingva evoluo" de Julio Baghy; "La vorta klaso" de Giorgio Silfer. Per la majstra interpreto de la Teatrofako de LF-koop, sub la reĝisorado de Teo Jurukov. 60'

INICIATOJ EKSTER LA KONGRESA PROGRAMO

Mardon je 14h00 kunvenos en Domo Naville de KCE la reprezentantoj de la diversaj esperantejoj, kiujn KCE invitis al libera konsultiĝo.

Merkredon kaj ĵaŭdon en la urbodomo de Loklo okazos la sesioj de la Parlamento de la Esperanta Civito, matene kaj posttagmeze.

Kursoj pri esperanto, por progresantoj kaj perfektiĝantoj, lundon, mardon, ĵaŭdon kaj vendredon matene, 8h45-12h15 en KCE (Domo Naville), je cent metroj de la kongresejo. Necesas mendi aparte ĉe KCE.

La Asembleo de Esperanta PEN-Centro okazos en Domo Naville de KCE, dum la kongresa semajno.

La Jarkunveno de AVE - Asocioj de Verduloj Esperantistoj okazos en Domo Naville de KCE, dum la kongresa semajno.

PENSIONO TUTE ELĈERPITA

Ne estas plu loko en la pensionoj. Restas la tendumejo, la junulgastejo kaj la unua hotelo. En la unua hotelo la mendoj baldaŭ elĉerpos la litojn. Eblos en dua hotelo tranokti, sed pli lukse (kaj pli koste). Meze de marto 2003 jam pli ol cent personoj aliĝis al la kongreso.

VIZOJ NUR ĜIS LA FINO DE MARTO

OKK zorgas pri invitleteroj kaj vizopetoj nur por efektive aliĝintaj (t.e. pagintaj) personoj, kaj nur ĝis la 31a de marto.

TUTTAGA EKSKURSO

Post la 31a de marto la tuttaga ekskurso (merkreda) ne plu estos senpaga: ĝi kostos po 10,- EUR, aldonendaj al la 15,- por la eventuala tagmanĝo en la ekstera restoracio. Bone por tiuj, kiuj jam aliĝis!


ANTAŬKONGRESO EN GRINDELVALDO

«Por la antaŭkongreso en Grindelvaldo (5-12 de julio 2003), restas sufiĉe da litoj. La Domo rezervas ilin ĝis la 30-a de aprilo, sed verŝajnas, ke eĉ post tiu dato eblos trovi litojn. Ĝis nun antaŭvideblas pli malpli certa partopreno de 13 ĝis 15 personoj, dum estas disponeblaj ĝis 40 litoj.

Se vin interesas tiu aranĝo kaj vi volas garantii la rezervadon de unu lito, bonvolu ricevigi al F.DEGOUL (aŭ al KCE) ĉekon de 183 eŭroj por pago de aliĝo kaj lito je minimuma tarifo. La kromajn kostojn (40-eŭran suplementon por nenaturamikoj, 20-eŭran por duĉambra lito, eventualajn manĝojn kaj ekskursojn), vi pagos post ricevo de la aliĝilo. Ankaŭ post la 30-a de aprilo ni provos rezervi litojn por vi, sed sen garantio.

Por informoj turnu vin al Francisko DEGOUL tel 00 33 1 48 58 71 94 aŭ ret-adreso: fdegoul@wanadoo.fr.
Viaj ĉekoj sendeblas al François DEGOUL , 54 rue des CAILLOTS, FR-93100 MONTREUIL
Uzu unu el la du jenaj kontoj :
-el la tuta mondo, al la poŝtkonto n° 23-2921-8 nome de KCE.
-el Francio, al la poŝtkonto n° 22-569-35 W PARIS nome de F.DEGOUL

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris



NOVA P.I.V.

Lanĉoprezo :
por Francio 70 € + 4,27 € (afranko)
por Eŭropo: 70 € + 7 € (reg.afr.)
ekster Eŭropo :
70 € + 9 € (reg. afranko).
la menditajn librojn.

HELPO AL LA ASOCIO

En Pollando (PLZ) Kossakovski 2,00; Bursztal2,00; Bogdziun 22,00; Banet-Fornal 2,00; Ulanowski 12,00; Kosobudska 22,00; Solecka 15,00; Janusz 10,00; Dabek 22,00;

NEKROLOGO

Ni ĵus eksciis tra la poŝto ke en Nove Zamky (SK) mortis nia kamarado

Ernö GELETA
(matr. 35466)

Ni kondolencas al familianoj kaj geamikoj.


*****

En Kistarcsa (HU) mortis la 5-an de februaro, 79-jara, nia kamarado

Zoltan SZENTGYÖRGYI
(matr. 35.154)

Ni kondolencas al la familianoj kaj geamikoj.

SAT havas novan domajn-adreson:
www.sat-esperanto.org



Ni legis por vi....

A. Cherpillod: *"La Kalendaro tra la tempo, tra la spaco"* La Blanchetière eld. 2002

Siacelen perfekte uzi kalendaron iam instruis al mi majstrino pri tiu arto: oficistino. Ĉe l'alveno de la novjaro, ŝi la unua ekprenis skribilon por noti la "pontumojn", t.e. la proksimecon de semajnofino kun festotago mezsemajna; tiam, zorge elektitaj unu-du tagoj da permesita ferio ebligis al ŝi senlaboran daŭron de seninterrompaj 4-5 tagoj (mi preskaŭ skribis: taŭgoj!). Neniu kapablis rivali kun tiu lertulino en ĉiujara akiro de ĉirkaŭ unu monato da kromripozo. Iam ŝi diris: "Ha! se mi kapablus antaŭvidi plurajn jarojn, antaŭkompreni kiel oni fabrikas kalendaron, kiel sperta mi fariĝus!" Tiu sinjorino nun emeritiĝis; mi tion bedaŭras; volonte mi donacus al ŝi la nacilingvan eldonon (ĉar estas kaj esperanta kaj franca eldonoj) de tiu mirinda klerilo pri la maniero kalkuli la tempon en ĉiuj eraoj kaj civilizoj. Oni devus diri ordigi, ĉar kalendaro ja estas homa provo de adaptado de okazaĵoj homkulturaj al la grandaj astraj fenomenoj, tagoj, tajdoj, sezonoj, kiuj enkadrigas la surteran vivon.

"Kalendaro estas socia afero" klarigas André. Komence la sun-, lun- kaj jarcikloj sufiĉis al niaj prauloj, ĝis oni rimarkis, ke tiuj unuoj (unitoj, kiel li skribas iom surprizige) ne estas akordigeblaj. Plie, ili varias laŭ daŭro. Kiel do oni elturniĝis laŭlonge de la jarcentoj? Neresumeble! oni devas plonĝi en tiun rakonton pasiigan kvazaŭ estus romano por koni la manierojn antikvajn, pra-Romian, Cezaran, Gregorian… ĝis la sistemo de la Franca Granda Revolucio, kun ties dekuma divido, kiun jam konis la Egiptoj! Pli ol la nomo de la tagoj en amaso da lingvoj (sreda, ketvirtodienis aŭ ortzegun estas la sama) la plej interesa parto eble estas la 15-a ĉapitro, pri la religiaj festoj, aŭ la 20-a, pri la eklezia komputo, t.e. la lokigo de la religiaj eventoj en la venonta jaro. Tiel ni revenas al nia komenca oficistino, post promenado tra la Hindia aŭ Azteka tempomezuradoj. La verko apoteozas en kalkulilo de t.n. "eterna kalendaro".

Iun tagon André Cherpillod iom miris, ke oni nomas lin nia ĉi-epoka Picco della Mirandola. Ĉu post tiu mirinda enciklopedieto pri kalendaroj oni povas kontraŭdiri tiun nomigon?

Johan' Luko